

Jubileo Mahatma Gandhi en La Chaux-de-Fonds kaj la Skiferio en Adelboden
Claude Gacond, 259-a radioprelego, 1968.09.25 & 28

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni hodiaŭ deziras vin informi pri du manifestacioj, kiuj okazos en Svislando.

A.- La unua ekcelebros la jubileon Mahatma Gandhi la 23 kaj 24-ajn de novembro en la urbo La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Jen kelkajn vortojn pri la programo de tiu kultura semajnfino.

A.- Dum la sabata posttagmezo Olivier Tzaut, unu el la svisaj instruistoj, kiuj donas lecionojn pri esperanto al siaj klasanoj, gvidos rapidan kurson pri nia lingvo. Dum unua leciono neesperantistoj konatiĝos kun la strukturo de la zamenhofa lingvo. Dua leciono proponos facilajn konversaci-ekzercojn.

Cl.- La samideanoj, kiuj alvenos, povos helpi paroligi tiujn komencantojn. Tiel naskiĝos en La Chaux-de-Fonds kelkaj novaj veraj mondĉivitanoj.

A.- En la fino de tiu posttagmezo kunvenos la svisaj esperanto-edukistoj.

Cl.- Kaj la oficiala manifestacio komenciĝos per komuna vespermanĝo.

A.- Fine de tiu manĝo alvenos esperanto-gelernantoj el la vilaĝo La Sagne, por ludi skeĉon pri la hodiaŭa monda situacio.

Cl.- Tiu skeĉo estas titolita :

A.- *En la vilaĝo Mondo.*

Cl.- Ĝi pruvos, ke en tiu vilaĝo la vivo ne estas tre agrabla. Dum kelkaj homoj ĉion posedas, aliaj ege malriĉas. Oni vidos manĝegulojn kaj samtempe malsatantojn. Unu magazeno estos rezervita por la riĉa malplimulto. Ĝi estos plenega je plej diversaj varoj. En la alia magazeno oni kvazaŭ nenion trovos. Kial ? Ĉar tiuj loĝantoj estas nepagipovaj.

A.- Tiuj geknaboj faros demandojn al la publiko. Ili informiĝos, ĉu la vivo en tiu vilaĝo estas plaĉa ?

Cl.- En ĉiu domo oni sin mem protektos kontraŭ la najbara atakemo.

A.- La fortuloj invados dum la nokto najbaran domon en la nomo de la amikeco. En la sama nomo ili ĝin balaos kaj majstros je propra profitemo.

Cl.- Kaj la aliaj rigardos timigite. Ĉu estas agrable vivi en tiu vilaĝo ?

A.- Ne, certe respondos la publiko.

Cl.- Jen estas via mondo, tiu, kiun vi al ni donacas, respondos la infanoj. Ni dankas vin !

A.- Tiu skeĉo devos komprenigi al la ĉeestantaro de tiu manifestacio, ke la hodiaŭa situacio estas maldigna je nia hejmo.

Cl.- Ĝi ankaŭ devas komprenigi, ke la hodiaŭa mondo terure etiĝis, kaj ke foraj mortigoj aŭ maljustaĵoj nin persone koncernas.

A.- Sekvos prelego de Cosette kaj Raoul Cop-Giroud pri la laboro de la Internacia Civila Servo en alĝeria vilaĝo kaj alvoko por la instruado en la lernejoj de ĉiuj landoj de kelkaj bazaj principoj pri monda civitaneco. Tiun lastan paroladon faros Jacques Mühlethaler, la prezidanto de la Monda Asocio por la Lernejoj Instrumento al Paco.

Cl.- Antaŭ kelkaj jaroj ni tradukis por vi kelkajn ĉapitrojn de unu el la libroj de tiu pac-aventuristo.

Jubileo Mahatma Gandhi en La Chaux-de-Fonds kaj la Skiferio en Adelboden
Claude Gacond, 259-a radioprelego, 1968.09.25 & 28

A.- La postan tagon je la naŭa horo malfermiĝos en la urba biblioteko, kie troviĝas la Ĉambro Edmond Privat, ekspozicieto pri la rilatoj inter Mahatma Gandhi kaj la geedzoj Edmond kaj Yvonne Privat.

Cl.- Tri prelegoj okupos la dimanĉan matenon.

A.- Eric Descoedres, redaktoro, prezentos la personecon de Gandhi sub la titolo : *Gandhi : homo, kiu ne timis.*

Cl.- Pierre Hirsch, la arkivisto de la Ĉambro Edmond Privat, raportos pri la rilatoj inter la ge-Privat kaj Mahatma Gandhi.

A.- Li anoncos la aperon de nova libro de Edmond Privat : *Vivo de Gandhi.* Temas pri radioprelegaro, kiun eble inter vi pluraj geaŭdantoj aŭdis.

Cl.- Max-Henri Béguin, pediatro kaj prezidanto de la Esperantista Grupo en La Chaux-de-Fonds, poste parolos pri la aktualeco de la aktiva neperforto.

A.- Kaj sinjorino Yvonne Privat konkludos tiun honorigon de la Jubileo Mahatma Gandhi per kelkaj rememoraraj vortoj. Ŝi intime konis la hindan liberiganton.

Cl.- Tiun manifestacion konkludos komuna tagmanĝo kaj posttagmeza promenado, kiu ebligos agrablajn kontaktojn kaj babiladojn.

A.- Se vi loĝas ne tro fore de Svislando kaj deziras partopreni tiun kulturalan semajnfinojn, skribu al Radio-Svislando por ricevi la programon. Ni ripetas la datojn :

Cl.- 23 kaj 24-ajn de novembro 1968.

A.- Loko :

Cl.- La Chaux-de-Fonds.

A.- La dua manifestacio interesos sportulojn. Temas pri skiferio.

Cl.- Por la 12-a fojo estos organizita skiferio en Adelboden, tio de la 27-a de decembro ĝis la 5-a de januaro 1969. Ni citas kelkajn informojn el la anoncilo :

A.- Adelboden estas skiparadizo en Bernaj Alpoj, alta je 1400 metroj.

Cl.- La partoprenantoj loĝos en simpla bela alpa ĉaledo

A.- aŭ lignodomo.

Cl.- Ĉiuj helpas por la interna doma laboro : kuirado, purigado. Estos do familia vivo.

A.- Aĝo de tiuj familianoj :

Cl.- de la 16-a jaro, kaj ĝis kiam oni ne plu sentas sin sportema.

A.- En la programo :

Cl.- skiado ; glitŝuado ; ekskursoj ; vesperoj kun prelegoj, diskutoj, festoj, ludoj.

A.- Prezo pro la tuta restado : 130.- svisaj frankoj aŭ 390 steloj.

Cl.- Kio estas malpermesata en tiu restado :

A.- La krokodilado !

Cl.- Se inter vi estas interesatoj, kiuj deziras partopreni similan skiferion, ili ankaŭ skribu al Radio-Svislando por ricevi la informilon.

Jubileo Mahatma Gandhi en La Chaux-de-Fonds kaj la Skiferio en Adelboden
Claude Gacond, 259-a radioprelego, 1968.09.25 & 28

A.- Ni ripetas la datojn : de la 27-a de decembro ĝis la 5-a de januaro 1969.

Cl.- Kaj la lokon : Adelboden.

A.- Kaj se vi ne povas partopreni tiujn manifestaciojn, vi povas eble sendi salutojn pere de Radio-Svislando. Oni respondos al vi el La Chaux-de-Fonds per foto de la Ĉambro Edmond Privat kaj el Adelboden per bela vintra poŝtkarto.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-